

la 30-an de Julio 1922

Kara samideano + Kongresano,

Mi absolute ne povas lasi tiun datrevenon sen skribi kelkajn vortojn por rememorigi vian belan Prahon Kongreson al vi.

Hodiaŭ 30-an de Julio 1921, sabaton. Mi alvenis Prahon 6-an<sup>1</sup> matene, lacigita, embarasata, nervema post 3-taga +<sup>2</sup> 3-nokta vojaĝo. Mi matenmanĝis en la stacidomo, purigis min, metis blankan robon + tagmanĝis kun iu samlandano via kiu, entuziasmigita pri la nova Respubliko, klarigis la tutan aferon al mi. Posttagmeze mi ripoziĝis + post de nove vespermanĝo en Rep. Domo, iris trame ĝis Zofin. Mi tuj rekonis vizaĝojn de aliaj Kongresoj<sup>3</sup>, interparolis, samtempe mi demandis min: "Ĉu Dro. F. estas tie?" Sro de Bebrudet<sup>4</sup> vidis min + volis paroli longe, kiam mi vidis mian edzon venante apud mi kun ... rekonatan vizaĝon<sup>5</sup> (kvankam pli dika ol sur la portreto). Manpremoj, afablaj ridetoj, k.t.p. + ni ĉiuj eliris sur la teraso por trinki bieron kiun mi tre eble neniam trinkis. Ĉirkaŭ la tablo rondo konata formiĝis. S-ino Ceuse<sup>6</sup>, Fraŭ-o Gérard, Allende el Hispanujo, Arnhold el Dresdeno + Ĉekoj – apud mi sidis S-ro Berger al kiu mi parolis (Ho! Se mi estus scianta pri li !!) kiu tre afable donis sian libreton.

Vi preskaŭ tuj demandis min: "Ĉu vi korespondos ankoraŭ kun mi?" ... + mi respondis "Nature, certe" (Kaj nun vi ĉiam petas pardonon pro prokrasto). Vi rigardis mian amatan libron + forprenis ĝin + enskribis. Post multaj paroladoj, ni ĉiuj forlasis Zofin + marŝadis ĝis la hotelo kie oni adiaŭis – ĉu vi memoras? Varma + bela nokto + hodiaŭ 1922 pluvegas!!

Dimanĉon 31 Julio 1922 – Vi venis preni mian edzon je 9.30 + iris preĝejon. Mi tre bone vidis vin de mia fenestro. Poste mi vidis vin en Zofin + vi sidis je tablo + oni trinkis mineralan akvon. Kiel varme estis !!

2

<sup>7</sup>... tagmanĝis en Rep. Domo kun von Trenkell + aliaj. En loĝio en la ĉambrego ni ĉeestis la Solenan Malfermon. Starantaj, oni kantis l'Esperon. Vi kantis apud mi – ĉu vi memoras la varmegon + vian ĉapelon? Ĉu ĝi ne estis difektigita post la Kongreso – ĝi certe neniam estis farita por ventumilo !! Mi forlasis vin ĉiujn + vizitis S-rinon Zamenhof kiu ploris preskaŭ en miaj brakoj. S-ro Privat parolis longe + bone! Mi serĉis drinkaĵon en boteloj por mia edzo sed oni ne permesis min ĝin porti al li.

Mi reiris hotelon por vestiĝi + vi prenis min tie + ni ĉiuj iris Zofin kie ni atendis 1h 1/2 por vespermanĝi. Vi ne sukcesis havigi ion. S-rino Blaise + mi mendis ovaĵon + vi porkaĵon. S-ro Legrand + S-ro Istel (lamulo) estis kun ni. Ni ankoraŭ revenis al la hotelo + adiaŭis – ĉu vi memoras kiel nia grupeto estis multaj sur la strato? Ĉu vi memoras kiel la muziko en Zofin estis bruanta + malhelpis la paroladojn? Kiel estis bele sub la arboj lumigitaj !!

Lundon, 1-an de Aŭg. Ĉe Zofin oni renkontiĝis + iris al monteto aliflanke de la Moldava. Tre tre varme. Mi admiris tiun parkon + ĝardenon. Oni sidis apud la Máchův pomnik + rigardis belajn fotografaĵojn de Praha + enskribis sur tiu de Mácha. Je 11h30 matene. Mi forportis de tie 3 libretojn

---

1 Je la 6-a

2 "+" estas uzata en la letero anstataŭ *kaj*

3 Kongresanoj

4 Ne malĉifrebla nomo

5 Rekonata vizaĝo

6 Ne malĉifrebla nomo

7 Ĉu mankas iu paĝo?

da belaj poezioj. Oni supreniris + vizitis la Panorama + spegulojn + vidis la grandegan "Eifel turon". Oni trinkis limonadon !!

Ni tagmanĝis en R. Domo + tramveturis al la Labora Kunsido. Mi sidis apud vi + S-ro Legrand. Poste promenado en tramo al belega parko kie oni trinkis ruĝan limonadon + glaciaĵojn + S-ro Legrand aĉetis cigaredojn en tiu plenaera kafejo. Li kuŝiĝis kiel junulo sur la herbejo ankaŭ. Ĉu vi memoris la belegajn rozojn florojn + la lagetojn. Mi forgesis ventumilon en la tramo + S-ro L. kuris + donis ĝin al mi. Ho! Kiel varmego. Mi vestiĝis por la koncerto. Tiu koncerto! Kiel bela ĝi estis. La virĥoroj! Kiel mi estis impresata. Kiel ni bone vidis + aŭdis! Vere, tiuj lignaj seĝoj + brakapogiloj estis bonaj en varma vetero! Ĉu vi memoras kiel la juna orkestrestro atendis por ke oni silentu!! Kaj la harpisto kiu rompis fadenon de sia harpo!

3

Ni trinkis intertempe kun S-ro L., vi + aliaj. Marŝado ĝis hotelo + adiaŭo.

Mardon 2-an de Aug. 1921. Mi sidiĝis en Zofin kun aliaj + ne vidis vin – tagmanĝi je la 12-a + poste promenis + manĝis glaciaĵojn en malgranda strato apud la horloĝo – kiel mia edzo ŝatis! Ni vizitis la urbodomon amase – mi parolis kun Belmont + D-ro Ŝos el Wien donis sian seĝon al mi dum urbo konsilantino parolis. Poste, trapaso de ponto sub la suno + laciganta sed agrabla promenado sur monteto kie estis multaj infanetoj sen vestoj – sidado antaŭ muro, sur la herbejo + multaj bestetoj flugis. Mi vidis foot-ball ludejon – poste sur benko kun pinto de mia ombrelo mi klarigis + desegnis la tenisludon! Mi vidas ĉion kvazaŭ estas hieraŭ – mi memoras ĉion! Mi vespermanĝis tute sola + iris hotelon vestiĝi por la balo + alvenis je la 10-a. Mi ne vidis vin nur de malproksime. Mi trinkis limonadon kun mia edzo + sidis en saloneto kun D-ro Arnold + edzino + S-ro Legrand (kiun vi vidis dancante kun la bela vendistino). Li nur dancis kun ŝi ĉar li ne havis frakon. Poste, mi vidis vin + dancis. Ĉu vi memoras vian miron pri la dividita frunto + mian miron pri via kutimo preni dancinton kiu dancas kun alia? Mi ŝatis tiun balon!!

Merkredon 3-an de Aug. Mi ne dormis kiel dum la tuta kongreso – stratoj bruantaj + tro varme. Mi sidis en Zofin + tagmanĝis kiel kutime. Post tagmeze oni iris tra ponto + en malnova kvartalo manĝis glaciaĵojn + suprenigas montetan parkon + sidis sur benkoj + babiladis. Mi memoras la konversaciojn tiel bone. Poste vi kinematografiis la Kongresaron. Post 1 horo da atendo mi foriris vestiĝi por la teatro – mi renkontis vin en teatro. Ĉu vi memoras la malĝentilan svedanon

4

kiu sidis antaŭ mia edzo? Intertempe mi babiladis kun D-ro Ŝos + D-ro Lorand el Buda Pesti + aliaj – eble kun vi ankaŭ. Poste agrabla vespermanĝo en stranga kafejo, ekstere kun vi + via familio al kiu mi nur povas rideti afable. Oni manĝis ŝinkon + blankan vinon. Via kuzino portis ruĝan ĉapelon. Mi sidis apud via kuzo kiu multe amuzis vin, + apud mia edzo. Vi sidis je l' fino de la tablo apud via kuzino al kiu vi diris kiam ŝi demandis "Ŝi estas franca". Mi tre bone komprenis. Fine ni foriris je la 1-a ĝis hotelo + adiaŭis.

Jaŭdon. 4-a tago al Karluvstyn. Ni revenis je la 6-a – mi sidis en Zofin, iris hotelo, vestiĝis + renkontis vin por vespermanĝi en R.Dom. Ĉiam la afabla kelnero ĉeestis. Poste promenado + vizitis kafejon kie oni aŭdis muzikon – oni rigardis ilustritajn ĵurnalojn. Apud ni sidis bela vizage<sup>8</sup> ĉeko – vi montris lin al mi. Poste promenado al hotelo + lasta adiaŭo dum vi atendis tramon – de la fenestro. Finita la Kongreso por vi.

Mi forgesis dum la balo ni, intertempe, trinkis en Rep. Domo. Ĉu vi memoras la belan aktorinon, kantistinon, apud Belmont kiu faris poeziojn – je nia tablo sidis ĉeko kiu ridetis ĉar mia edzo petolis + poste li prenis min por danci.

---

8 Ĉu "vizaĝe"?

Alifoj ankaŭ la 1-an, vespere, ni ĉiuj kun S-inoj + fraŭlinoj trinkis en la kafejo ekstere R. Dom – ĉu vi memoras ... Oni ŝajnis multe trinki sed estis tiel varme ...

Mi memoras multe pli ol mi povis skribi sed estus tede por vi se mi pli longe skribus, eĉ mi timas ke vi ne trovas tion interesa – tiam ĵetu ĝin en korbeton ... Mi revivis tiun kongreson skribante ... Ho! Kiel belaj mallongaj tagoj! Ĉu ne? Estos en Varsovio en 1923 + mi esperas iri. Mi ricevis fine leteron de Sofio Zamenhof kiu estas hejme. Mi skribis al vi la 11-an de Julio sed forgesis ĉu mi sendis fotografajetojn, diru al mi + mi sendos

5

Tie<sup>9</sup> estas la plena sezono sed malfeliĉe estas preskaŭ ĉiam malbona vetero – pluvo, vento. De post 4 tagoj estas aŭtomobilaj kuradoj – tre gravaj – 30 kilom. ronde + ili faras tiun rondon 10 foje. Hieraŭ estis la ĉefa tago + oni devas leviĝi je la 4-a ĉar poste la vojo estas fermita. Sed pluvegis. Hodiaŭ (+ sabato) estas tre bela vetero – tio estas ironia !!

1-a p.m. 31-an de Julio

Ĉevalkuradoj – boataj kuradoj – tenisaj turniroj, artaj fojraĵoj, dancoj, teatroj, k.t.p. ĉie + ĉie estas amuzoj. En la kasino oni ludas (hazardludoj) kiel en Monte Carlo – baccarat, petits chevaux, la roulette, la boule, k.t.p. Multaj ludas, gajnas ... + perdas sian tutan monon. Mi neniam ludas. Mi ofte iras Kasino kelkafoje, dancas iras al klasikaj koncertoj aŭ al teatroj sed mi ne havas la pasion por la ludo. Terura pasio ĝi estas. Vi do povas imagi kio estas mia sezono en B. Marbanantoj estas multaj ankaŭ. Multaj angloj venas ankaŭ.

S-ro Sibrava el Znojmo poste petinte min skribi al mi, poste de nove peteginte min korespondi nun tute ĉesis skribi al mi. Aliaj ĉekoj agis same.

Ĉu estas la kutimo ĉe viaj samlandanoj esti plenaj je ardeco + poste forlasi por aliaj aferoj?

Mi ĵus revenis el la teniso kie mia filo

5a

*Eltondaĵo*<sup>10</sup>

*Pri morto de samideano Sergeant el franca gazeto "Le Télégramme" de 9.VI.1934*

6

ludis bonege, mirinde + gajnis 3 foje en la campionato por tuta Norda Francujo + li estas la plej juna. Morgaŭ mi pasigos la tagon sur la kamparo, en Hardelot – estas sablmontetoj kie kreskas pinarbaroj - belega loko – ankaŭ estas maro.

Kiel mi esperas ke via filineto fartas bonege + ankaŭ via edino. Ĉu ŝi ĉiam tradukas Esp. Kun vi? Eble la okupado pri la filineto malhelpas tion. Sed vi estas ankoraŭ tiel entuziasmigita ĉu ne? Diru jes! Ne forlasu tiel bonegan aferon, ne forlasu!

S-ro Legrand trapasis, ŝipe, Boulognon sed mi ne vizitis lin sur maro ĉar estis nokte + li estus estinta kuŝata – mi nur sendis leteron al li + el Hamburgo li respondis rakonte pri la striko de ŝipoj germanaj. Li devis telegrafi al Helsinki kiu konsilis al li preni finan ŝipon el Stettin – tedaj estas la formalajoj en la fina konsulejo en Hamburgo, krom la pasportoj, li devas plenigi 12 foliojn por sia familio. k.t.p. - Feliĉe ke mi ne iris. Imagu min tiele sen koni germanan lingvon!

9 Aŭ "Ne" ? Malbone legebla

10 Ŝajne la eltondaĵo ne apartenas al tiu ĉi letero

Mi nun salutas vin, kara kongresano, + adiaŭas vin kiel mia edzo + mi faris tiel ofte antaŭ unu jaro.  
Eble tio revenas... Salutojn al via edzino – kareseton al la kara Eva.

Samideane amike

Acie<sup>11</sup> Sergeant

---

11 Ĉu "Alice" ?